# KOMITATO
# 8-a de junio 2025

0.1 **Kontrolo de la ĉeestantoj kaj rajtigitoj** 5 min

Dimanĉon la 8-an de junio 2025, de la 16a ĝis la 18a kunvenis dum la kongreso de Nanto kaj rete pere de Zoom, la Komitato de Espéranto-France.
[ĉeestas: S = surloke en la kongresejo, R = rete pere de Zoom]

| PERSONA NOMO | FAMILIA NOMO | MALLONG. | KOMITATANECO | ĈEESTAS | SENKULP. | FORESTAS | RAJTIGAS |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Raymonde | COQUISART | RC | Repr. de la membraro | S | | | |
| Régis | FABRE | RF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bruno | FLOCHON | BF | Repr. de la membraro | S | | | |
| Clément | GENTY | CG | Repr. de la membraro | | | X | |
| Xavier | GODIVIER | XG | Repr. de la membraro | S | | | |
| Aleks | KADAR | AK | Repr. de la membraro | S | | | |
| Michaël-Boris | MANDIROLA | MBM | Repr. de la membraro | | | X | |
| Sébastien | MONTAGNE | SM | Repr. de la membraro | S | | | |
| Marcelle | PROVOST | MP | Repr. de la membraro | S | | | |
| Bruno | ROBINEAU | BR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Clément | ROUSSET | CR | Repr. de la membraro | S | | | |
| Victor | SIMONNET | VS | Repr. de la membraro | R | | | |
| Bertrand | VERSTRAETE | BV | Repr. de la membraro | | X | | |
| Jean-Luc | THIBIAS | JLT | Repr. de fed. France-Est | R | | | |
| Pierre | GAUTHIER | PG | Repr. de fed. Paris-Île-de-France | S | | | |
| Isabelle | NICOLAS | IN | Repr. de fed. Limousin | R | | | |
| Xavier | DEWIDEHEM | XD | Repr. de fed. Hauts-de-France | | X | | |
| Claude | BENSIMON | CB | Repr. de fed. Bretagne | S | | | |
| | | | Repr. de fed. Poitou-Charentes | | | | |
| Thierry | SPANJAARD | TS | Repr. de fed. Provence | S | | | |
| | | | Repr. de FET | | | | |
| | | | Repr. de FKEA | | | | |
| Didier | JANOT | DJ | Repr. de GEE / İLEİ-Francio | S | | | |
| Rémi | DENEU | RD | Repr. de fed. Auvergne | | | X | |
| Gabin | FORCIER | GF | Repr. de JEFO/ Espéranto-Jeunes | S | | | |

17 ĉeestis el 22, 2 senkulpiĝis, 0 donis povon.
Estas kvorumo (½) voĉoj

0.2 **Elekto de prezidanto kaj protokolanto** 1 min
XG prezidantas MP protokolas

0.4 **Dato de la venonta kunsido + klarigo pri la komitatkunsidoj** 4 min
Dato : 18a (por laborgrupoj) kaj 19a oktobro 2025 (komitatkunsido)
Funkciado de la komitatkunveno : 4 minimume komitatkunsidoj : 2 surloke dum la nacia kongreso, 2 ĉe la pariza sidejo (surloke aŭ rete). Dum la pasinta jaro okazis 2 pliaj kunvenoj nur rete (en marto kaj majo).
La vojaĝkostoj de komitatanoj elektitaj de la individuaj membroj estas repageblaj (laŭ 2-klasa trajnbileto, duone se elektita de aliĝita asocio) aŭ eblas rezigni pri repago kontraŭ donacatestilon kiu permesas deklaron al la impostadministracio.
Reta komitatkunsido okazos intertempe le 3an de julio de la 20-a ĝis la 22-a horo.

## 1. KUNORDIGO (administrado kaj financoj)

### 1.1 Elekto de la estraro — ELEKTO 25 min

La estraro kunvenas monate kaj rete dum 2 horoj. La kandidatoj al la estraro estas Xavier GODIVIER, Régis FABRE, Raymonde COQUISART, Marcelle PROVOST, Clément ROUSSET, Sébastien MONTAGNE, Victor SIMONNET, kaj Pierre GAUTHIER.
Unuanime akceptita.

### 1.2 Nova aliĝilo 2025-2026 — DISKUTO 10 min

- Kontakti (XG) ĉiujn lokajn asociojn kaj kontroli ĉu la kosto de la kotizo estas la sama aŭ ne. Se ne, kiom estas la kotizo ? XG
- Asocio de Hérouville Saint Clair jam decidis aliĝi la komunan kotizsistemon. Necesas informi Emmanuelle Richard por ĝisdatigi la aliĝilon. XG
- Aldoni sur la unua paĝo la desegnon de la kalendareto
- Al la novaj aliĝantoj, oni zorge sendu membrolibreton de Esperanto France (vidu https://esperanto-france.org/livret-des-membres ). Memorigi tion al Said.
- Necesas ricevi informon pri la UEA kotizoj (dum la UK komence de aŭgusto)

### 1.3 Strategio kaj laborplano de la nova komitato — DISKUTO 15 min

Ni bezonas restarigi la komisionojn pri diversaj temoj : komunikilo, trejnado, prelegturneoj, tio okazos kaze de retaj kunvenoj al kiuj estos invititaj komitatanoj kaj lokaj aktivuloj.

### 1.4 Organizo de la esperantaj grupoj : loka, departementa, regiona kaj nacia

En Bretonio, estas multaj lokaj grupoj kaj kelkaj departementaj (kiel Armor grupo). Por havi lokon, estas pli facile esti loka grupo, sed kiam la klubo malaperas, nenio restas eĉ se restas kelkaj esperantistoj. Kadre de Bretonio, necesas prilabori tiun temon kaj konigi la decidon.

## 2. KONSCIIGO projektoj, (ERIK = Eksteraj rilatoj, informado kaj komunikado)

### 2.1 Restarigo de laborgrupoj kun lokaj aktivuloj (rete plej ofte) — DISKUTO 10 min

### 2.1 Ĝisdatigo de niaj komunikiloj : kalendaretoj, faldfolio, paneloj, retejo — DISKUTO 10 min

#### 2.1.1 kalendaretoj

- Necesas peti Robin proponon por la kalendaretoj. Ricevota por la fino de junio.
- Nombro da kalendaretoj presotaj : decidu tion dum la venonta komitatkunsido julie post koni la nombron kiu restas de la nuna jaro.
- Aldonu rapidkodon sur la kalendareto, preparu la statistikon pri la vizitoj uzante tiun kodon.

#### 2.1.2 faldfolio

- Necesas specifan priskribon por refari la faldfolioj. Bruno Flochon proponas bazon diskutendan : https://docs.google.com/document/d/1K2rEM_p2WX_2SRNEi1gTFB_zPRzh5TWockZMQldP5pw/edit?usp=sharing

#### 2.1.3 paneloj

- Necesas trovi volontulojn por labori por nova materialo aŭ almenaŭ ĝisdatigi la ekzistantan 12-panelan ekspozicion.

#### 2.1.4 retejo

- ĝisdatigo : Emmanuelle Richard mem faris tion. Ĉu ŝi ankoraŭ interesas pri tio ?
- renovigo de la reto : Xavier proponos kunvenon. Ĉu ni bezonas profesiulon ?
- pripensu uzi filmetojn anstataŭ tekston por prezenti aferojn.

### 2.2 Lanĉo de trejnad-sesioj: unue pri retaj socioj — DISKUTO 5 min

## 3. KOMUNUMO (kongresoj, kulturo...)

3.1 ***Le Monde de l'Espéranto*** **DISKUTO** 10 min

Kiu rezulto pri la kontakto kun Celine Bernard ? BF/XG
diskutenda dum la venonta reta kunveno.

3.2 **Kongreso 2026** **INFORMO** 10 min

Urbo, asocio?
La Provenca federacio proponas organizi la 2027an kongreson en Marseljo, sed bezonas rapidan decidon. Ili diskutos la 24an de junio la aferon. Raymonde kontaktis kelkajn aliajn grupojn (Hérouville Saint Clair, Belfort, Tours), ni atendos do respondon dum la venontaj semajnoj.
Eble Provenco kandidatos ankaŭ por UK 2032, 100-jariĝo de la Esperanto-grupo de Marsejlo.

3.3. **Starigo de teamo pri prelegvojaĝoj** **DISKUTO** 5 min

Kun naciaj kaj regionaj respondeculoj. Renée Triolle trovis volontulon en Provenco kiu povos helpi nacie: Frédéric Gilles.

## 4. KAPABLIGO (instruado kaj ekzamenoj)